

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2015:3

La 26:an de julio,

Esperantistoj el la gotenbarga esperantoklubo kunvenis en la Lingvo-kafejo en Esperantoplatsen. La antaŭan tagon ni havis la ordinare planitan kafejrenkonton en Slottsskogen. Tamen ses personoj venis por celebri la Esperanto-tagon. Kun la flago kaj la UEA-afiŝo sur la tablo kaj kun verdaj T-ĉemisoj ni vere estis videblaj. La afiŝo ankaŭ troviĝis en la urba biblioteko kaj en unu loka biblioteko.

Du paroj el la kafejgastoj interesiĝis pri nia "Divenu pri kiu lingvo temas" La unua paro solvis la tutan paĝon kaj rekonis eĉ la gotajn, la sanskritajn kaj la grekajn vortojn - aŭ eble sukcese divenis.

Siv Burell



En lyckad sommarvecka

Tillsammans med Vuxenskolan ordnade SEI esperantokurser med tre lärare och 15 deltagare. Årets studiebesök gick till Frimurarlogen. Ingegerd Granat, som är mycket intresserad av Göteborgs historia, hade med en passus om frimurarlogen i sin 7-sidiga turistbroschyr *Gotenburgo el birda perspektivo*. Den användes också som studiematerial under sommarveckan.

Siv Burell



Bela surprizo en Lillo

Je nia plezuro Marjorie Boulton Japeris en la kongresejo kaj eĉ dufoje estis organizita tiel nomataj "aŭtoraj duonhoroj" kun ŝi en la libroservo.

Ann-Louise



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2014 • 102-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

sveda@esperanto.se

E-post till redaktionen: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration 2014: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Besöksadress: Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift 2014:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Box 2276, 103 17 Stockholm

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@esperantosverige.se

Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperanto.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. sv

Arbetet med nästa års kongress är i full gång. LKK består av medlemmar ur både Malmö Esperantoförening och Triurba Esperantista Asocio Torento i Gdansk/Sopot/ Gdynia. En första information kan ni se i detta nummer av La Espero. Fylligare information kommer i nästkommande nummer av tidningen men framför allt på EsperantoSverige.se under rubriken Eventoj (svespkon.esperantosverige.se). Där kommer ni också att kunna beställa det elektroniska nyhetsbrevet "Kongresa Bulteno". Följ Stens uppmaning och studera Esperanto under hösten och vintern, och delta sedan i en annorlunda SEF-kongress! Naturligtvis inbjuder vi även denna gång de övriga svenska esperanto-organisationerna att ha sina årsmöten under kongressen, som dock i högre grad än vanligt kommer att fokusera på turism och kulturupplevelser.

Vi testar en ny rutin inför vårens kongress. Avgifterna ska betalas till SEFs specialkonto så att vi lättare kan urskilja och hålla koll på vilka som betalat.

Medlemsregistret har nu kollats och korrigerats, men vi har ännu inte hittat det optimala programmet som kan hantera både medlemsregistret och bokföringssystemet så som vi vill ha det. Arbetet fortsätter i bakgrunden, det är inget som ni medlemmar märker av än så länge.

Efterarbetet med vårens informationsträffar i Skövde och Uppsala tar vår nye styrelseersättare Gabriel Erixon i Luleå hand om. Vår förhoppning är att det går att skapa en fristående grupp av intresserade och aktiva som kan samarbeta för att få informationsarbetet att ta ett skutt framåt. Våra gamla broschyrer är föråldrade och behovet av nytt material är skriande. Styrelsens uppgift är inte att göra hela jobbet. Dess uppgift är att "styra" det. Även intresserade som inte var med på träffarna välkomnas! Just nu diskuterar styrelsen en möjlig ny broschyr kallad "Det gröna språket", men mycket mer behövs för olika kanaler till olika målgrupper inom olika ämnesområden.

Förra årets "fruktträff" hette FERo/Citronträffen och tilldrog sig i Borlänge. Dan Palm har i uppdrag att undersöka om SEF gör en repris eller om Härnösandsklubben tar upp sin Apelsinträff igen.

Vi har som vanligt en annons i Studieblocket som går ut till studenter på vissa orter.

På den Europeiska språkdagen i höst har Polska institutet frågat om vi vill dela bord med dem. Samarbete pågår.

Inför Språkdagen den 26 juli skickade vi ut några affischer som sattes upp på biblioteken i Karlstad, Västerås, Norrköping, Lesjöfors, Göteborg, Stockholm (Wim satte upp affischen i Kulturhuset), Malmö, Hässleholm och Helsingborg enligt de rapporter som inkommit.

Styrelsen

Nästa år kongressar vi i den polska östersjöstaden Gdansk, som tillsammans med städerna Sopot och Gdynia bildar den s.k. "Trestadsområdet" med totalt ca 1,3 miljoner invånare.

Att förlägga en SEF-kongress i Polen blir en utmaning. På plats i Polen har vi 4 esperantister som är beredda att stå för den turistiska och kulturella delen av kongressen. Två av dem, Elwira och Jagoda, har vi redan träffat på årets SEF-kongress i Uppsala när de presenterade sina städer.

Årsmöten och andra organisatoriska uppgifter planerar vi att genomföra under lördagen (7/5) på det hotell vi har som första alternativ för boendet.

Varför i Polen?

"Trestadsområdet" är en spännande plats att besöka med historiska anor. I Gdansk startade 2:a världskriget och senare den östeuropeiska kommunis-

mens fall genom fackföreningen Solidaritet.

Det går lågprisflyg från Stockholm, Göteborg och Malmö, eller för den som så önskar båt från Karlskrona. För att underlätta kommer vi längre fram att göra en förteckning över de olika resmöjligheterna. Inte bara resan, utan även vistelsen i Polen är än så länge för oss svenskar hyfsat billig. Och inte minst, vi får träffa nya vänner och praktisera Esperanto på allvar!

Planera för Gdansk!

Att åka till Gdansk nästa år kan vara ett utmärkt mål för nybörjare och kursdeltagare. Läs Esperanto under hösten och våren och praktisera språket på en som vi hoppas spännande kongress!

Kontakta gärna undertecknad om du har frågor eller förslag:

Sten Svenonius
sten(at)agado.net
073 9718078.



Fotoj: Elwira Twardowska

Post la renkonto kun "Valdemar Langlet" en la trajno al Skövde – kio okazis?

La kontakto kun Mikael Engström daŭris. Je la kutima maja festo de la gotenburga esperanto-klubo en Hökälla (la iama bakejo apud Lillhagen), interesaj prelegantoj ĉeestis – Mikael Engström kun siaj gepatroj Carl kaj May-Gun Engström.

Kiel vi scias, se vi legis la artikolon pri Langlet en la antaŭa numero de La Espero, la familio Engström havas ligilon al la familio Langlet. Mikael ja diris: "Mia



avino ekde sin naŭa jaro elkreskis kiel filino en la familio ĉe la artisto Alex Langlet, frato de Valdemar Langlet, fondinto de la unua sveda esperantoklubo en Upsalo".

Kelkaj volis ke mi skribus la artikolon en Esperanto, sed tiuokaze Albert Herranz, neniam estus leginta ĝin. Li estas filmisto pri dokumentaj filmoj, kaj la sorto de Nina kaj Valdemar Langlet interesas lin. Li baldaŭ venos de Stokholmo al Gotenburgo por intervjui la familion Engström kaj kiel antaŭscio li legis "Kaos i Budapest" de Nina Langlet (tradukita en Esperanton de Kalle Knivilä 2001) kaj "Verk och dagar i Budapest" de Valdemar Langlet. Grave estas ankaŭ kontakto kun Agneta Emanuelsson, kiu scias multon pri Valdemar Langlet kaj skribis libron pri li.

Se vi, kara Leganto volas kontribui per iu interesaĵo pri Lang-

let – bv sciigi la redaktoron, kiu plusendos vian konon al Albert Herranz. Kaj vi, stokholmanoj, invitu Albert al komencanta kurso. Li volas studi Esperanton.

Nia prezidanto Ingegerd Granat kreis novan tradicion por la gotenburga klubo: partopreno en Blodomloppet (Sangoĉirkulado), konkuro por apogi esploron de sangaj malsanoj. Mikael Engström, ĵurnalisto, vere reklamis esperanton kaj esperantistojn dum sia kurado (legu: promenado). Homoj ja staris flanke de la kuradvojetoj. Ĉirkaŭ 3000 personoj ĉeestis en Slotsskogen.


Mi ne povas ne preteriri nian novan kasiston Anna Eriksson, kiu kuris 5 kilometrojn je 28'50 minutoj.

Gratulon, Anna!

Raportis
Siv Burell
siv.burell@gmail.com

Rättelse

Som framgår av artikeln t.v., är Nina Langlets bok "Kaos i Budapest" redan översatt till Esperanto. Kalle Knivilä översatte den 2001. I förra numret av La Espero angavs motsatsen.



Kelkaj travivaĵoj inter la 23:a de julio kaj 1:a de aŭgusto

Post komforta trajnveturo al Malmö, Aino kaj mi konektiĝis kun finna grupo kiu vojaĝis per aŭtobuso kaj aliĝis al ili. Tranokte en pramsĥipo al Travemünde ni estis vekitaj du fojojn ĉar la poŝtelefono sonoris pro ŝanĝitaj kotizinformoj – Danio kaj Germanio. La sekvan tagon ni vojaĝis per la aŭtobuso tra tri landoj antaŭ ol ni estis en Lille kaj la centfoja universala kongreso de Esperanto. Bonega hotelo Ibis, ankaŭ tio prizorgata de nia finna vojaĝgrupa gvidanto Tiina Oittinen.

La kongreso estis tre bona laŭ mi – ĉirkaŭ 3000 personoj de 80 landoj ne estas facile organizi. Samtempe oni elektis tro malgrandajn ĉambrojn por tro popularaj prelegoj kaj teatraĵoj. (mi iam atendis pli ol unu horon antaŭ estis permesata eniri por esti certa havi bonan sidlokon). Mi plej multe ŝatis la prelegon pri Bretonio kaj ties apartan pejzaĝon kun multaj megalitoj (bautastenar) starantaj en vicoj preskaŭ same kiel sur la Paska insulo. Carnac nomate. Bretonio havas la plej grandan tajdodiferencon en la mondo, du fojoj jare je 14 metroj.

La teatraĵo “Viro-ŝemo” temis pri kio okazis al la virinoj kiuj estis forlasitaj tute solaj sen viro post la Napoleona milito. La koncertoj de Kajto estis bonegaj kaj kia granda ĝojo kanti kune kun

ili! Dum la kongreso ankaŭ estis ĥoro en kiu mi partoprenis. Ni kontribuis sur la estrado dum la Internacia Arta Vespero kun du kantoj “Fluanta tajdo” kaj “Jen mia preĝo”.

En la komenco de la semajno estis aranĝite surstrate kunkantado de francaj kanzonoj en Esperanto, kelkcentoj da homoj aliĝis kaj oni staris en la granda placo, antaŭ la urbodomo mi pensas, kaj kune kun amazoj da homoj kantis 18 kantojn de i.a. J Brel kaj Charles Trenet.

Merkrede mi vizitis la mezepokan trankvilan, belan urbon Brügge en Belgio. Preskaŭ tute konstruata de brikoj (la lignodomoj estis forbrulitaj). Nia bonega gvidanto, (Alex?) de Barcelona senmanke kondukis nin tra malvastaj stratoj (mi povis senti la murojn samtempe de ambaŭ flankoj) en mirindaj monaĥejoj ĝardenoj. Tie kompreneble ankaŭ estis Belfrido – la alta turo kiu gardis la urbon kontraŭ fajroj kaj malamikoj. Antaŭ bona gusta manĝo en bierfarejo kaj restoracio *De Halve Maan* ni havis eblecon boati en la kanaloj.

Multajn aliajn belajn memorojn de la kongreso mi prenis hejmen kaj ne la plej malgranda estis iliaj kukoj de *St Michel la Grande Gallet* kaj la neforgesebla Madelenekukon!

Margareta Andersson

Rememorante la 100-an UK

Rememorante la 100-an Universalan Kongreson en Lille mi volus elstarigi tri erojn, en kiuj mi partoprenis, kaj kiuj aparte plaĉis al mi.

La ĉefa sendube estis la tuttaga ekskurso al Bulonjo ĉe maro (Boulogne sur Mer) kaj ĉeesto en la teatro en kiu okazis la 1-a UK en 1905, kaj kie L Zamenhof faris sian faman paroladon. Krom kelkaj solenaj paroladoj, i a bonega de la prezidanto de UEA, Mark Fettes, estis laŭtlegita la tuta parolado de Zamenhof. Eblis senti la “misteran” etoson de la unua kongreso! Entute ni estis varme bonvenigitaj de la urbo, kiu konscias pri sia graveco rilate Esperanton. Post procesio tra la urbo estis solene malkovrita busto de Zamenhof.

Ĉifoje tre impresis min ankaŭ la nacia vespero. Niaj francaj geamikoj havas tre kompetentajn muzikistojn kaj donis al ni tre ĝuindan vesperon el la mondo de la franclingva muzika kulturo.

Tria ero, kiu tre interesis min, estis prelegoj en la IKU, la kongresa universitato. Plej interesaj por mi estis la prelegoj de Amri Wandel, profesoro pri astronomio ĉe la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Li lerte klarigis al ni la esencon de la teorioj pri relativeco de Albert Einstein, la speciala kaj ĝenerala. Interesa fakto estas ke Einstein publikigis sian unuan teorion en 1905, do grava jaro en la evoluo de la homaro! Fine ni povis trapasi skriban ekzamenon pri liaj teorioj kaj ricevi ateston pri nia sukceso.

Kun danko mi pensas ankaŭ pri nia dana samideano Peter Wraae, kiu ege bone organizis la buskaravanon inter Kopenhago kaj Lillo. Dum la kongreso mi ricevis favoran impreson pri la laboro de la slovakaj esperantistoj organizi la 101-an UKn en Nitra. Kiel partoprenonto mi volonte vojaĝus ankaŭ tien en iu karavano.

Sten Svenonius



MAS /Martin Strid

Esperantistiska barn /Martin Strid

Nederländska Kapriol' på MAS /Martin Strid

Granda kongreso kaj ĝojiga sukceso

La Universala Kongreso de Esperanto en Lille estis granda kongreso kaj ĝojiga sukceso. Aliĝis 2698 Esperantistoj el 80 landoj, el kiuj 38 el Svedio, plus homoj, kiuj aĉetis unutagajn biletojn. Multaj estis gejunuloj. Mi la unuan fojon renkontis Orient-Timorajn esperantistojn, i.a. junan studenton de juridiko. Li komencis lerni Esperanton antaŭ unu jaro, sed tamen jam bone parolis la lingvon.

Mi i.a. ĝuis plurajn teatraĵojn. Unu el ili prezentis itala profesia teatro grupo. En ilia dramo Esperanto estis la lingvo de la enmigrintoj.

Leif Nordenstorm

Bonega laboro

La LKK de la 100-a UK en Lillo faris bonegan laboron por videbli Esperanton kaj la kongreson al la ekstera publiko pere de reklam-ŝildoj, montriloj al la kongresejo, artikoloj en la loka ĵurnalo, koncertoj en kulturcentroj kaj sur la Teatra Placo, rapidkursoj en la kongresejo por la loĝantoj de Lillo ...

Sur la fotoj (sube) JoMo koncertas kune kun okcitana grupo kaj dancigas la publikon.

Ann-Louise



Fotis Ann-Louise Åkerlund

Tra la stratoj de Lilo /Wim Posthuma



Ok tagojn Esperanto kaj iom la franca lingvo

Tiuj tagoj okazis en la franca urbo Lilo kaj en la kongresejo *Lille Grand Palais*, kiu ne estas palaco sed moderna konstruaĵo. La aspekto de la kongresejo tute ne estis impona. Aperis nur malgranda ŝildo kaj videblas tri E-o flagoj grandparte duonstange. Kial? Tamen neniu mortis.

Sed la partoprenantoj de la UK estis vivantaj ŝildoj kaj informuloj al Esperanto. Amasoj promenis en la centro de Lilo kun siaj videblaj nomŝildoj kaj mansakoj kun indiko pri la UK.

Tute alie estis en *Boulogne sur Mer*, la lulilo de la UKoj. Ĉie en la urbo videblis E-o flagoj eĉ de la turo de la urbodomo. Tie neniam antaŭe videblis fremdan flago ol la francan.

La kongresejo havis 23 salonegojn, salonojn kaj ĉambrojn, malfacile troveblaj. Ili estis sufiĉe laŭ mi por la Solena Inaŭguro kaj vesperaj kulturaj aranĝoj kaj por ĉiuj kunvenoj, prelegoj ktp. La Palaco tre taŭgis por la 2689 partoprenantoj, kiuj volis iom sperti la centan UKon. Eĉ estis loko kaj seĝoj por privataj rendezuoj kaj du etetaj kafejoj.

La ĉefan tagmanĝon oni prenis en ne tiel apudaj restoracioj, kie oni renkontis novajn aŭ amikojn de antaŭaj UKoj. Ili ofte rekonis min, ne inverse, bedaŭrinde.

Mi multe filmis kaj ne multe fotis. Mi nur partoprenis unu kunsidon, tiu de la verduloj (AVE), ĉefe por verki artikolon helpe de la filmo mia. Miaj okuloj iĝas pezaj ĉeestante kunsidojn. Pro tio mi aŭskultis koncertojn. Ne ĉiujn, ĉar estis 34 eblecoj ilin

aŭskulti dum kvin tagoj. Estis 22 muzikgrupoj aŭ soluloj kiuj prezentis sian muzikon. La plej impona okazis dum la Nacia Vespere. Mi neniam dum UK tian spertis. Rigardu filmon poste! La multnombraj samideanoj kiuj nomiĝas "La kompanoj" ricevis grandan laŭdon. Landon ili paradis kune kun aliaj kongresanoj tra la stratoj de Lilo al la granda placo por muziki kaj kunkanti (vidu la bildon sube maldekstre). La preterpasantoj certe rimarkis ke okazis invado de esperantistoj en Lilon.

Ankaŭ okazis teatraĵoj. Impona estis tiu de la italoj "Feliĉas ĉiuj". Ĝi estis dulingva. Kiam estis en la itala, vi povis legi la esperantan tradukon samtempe kiam la aktoroj havis maskojn. Krome okazis 10 prelegoj de la Internacia Universitato.

Por plibonigi vian scion de Esperanto okazis 16 lecionoj kaj eĉ ekzameno. Mi hazarde provis klarigi al ili kiuj sidis ĉe mia tablo la tipajn "malfacilaĵojn" en la gramatiko kiel ekzemple la necesan akusativon kaj la diferencon inter la sufiksoj ig kaj iĝ. Tiaj lecionetoj donis agrablan etoson inter ni. Se vi volis scii iom pli pri, aŭ volis plibonigi la scion de la franca lingvo okazis 8 lecionoj. Krom tio kion mi menciis okazis multe, multe pli dum tiuj 6 tagoj en Esperantujo. La vizito al la lulilo de la UK, Boulogne sur Mer estos speciala memoraĵo dum la resto de mia vivo.

Ankaŭ valoras menci i la ekskursojn al la Mineja Muzeo, Parizo, Bruĝo kaj Amiens

Wim Posthuma

Kongresaj kurieroj de UK Stokholmo 1980

De preskaŭ ĉiuj kongresaj kurieroj de la lastaj jardekoj mi intertempe sukcesis akiri kompletajn kolektojn, sed ne de Stokholmo. De tiu kongreso mi nur havas du foliojn, numero 3. Por la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet en Kortrijk, Belgio mi kolektas la kongresajn kurierojn de la Universalaj Esperanto-Kongresoj de la pasintaj jardekoj. La ĝis nun trovitaj kolektoj estas je <http://1drv.ms/12l2az9>

Mi ankoraŭ estas serĉanta la kongresan kurieron de la UK en Stokholmo, 1980. Ĉu vi scias kie mi povus trovi ĝin? Kiu povas havigi al mi skanaĵojn de la originalo por fari pdf-dosieron?

Roland Rotsaert

roland.rotsaert@gmail.com
www.esperanto-kortrijk.info



Esperanto-Tago 2015 plurloke afiŝita

Antaŭ la ĉi-jara Esperanto-Tago la 26-an de julio la SEF-estraro pere de Anita sendis la oficialan afiŝon en la sveda lingvo al pluraj kluboj kaj membroj. Ni petis raportojn, prefere kun bildoj, de la rezulto kaj venis raportoj de Karlstad, Västerås, Norrköping, Lesjöfors, Göteborg, Stockholm (Vim pendigis afiŝon en la Kulturdomo), Malmö, Hässleholm kaj Helsingborg.



Klubo de Södertörn eniras klubon de Stockholm

La membroj de la esperantoklubo de Södertörn havis jarkunvenon, kaj decidis eniri en la Esperanto-Klubon de Stockholm. La membroj en Södertörn jam pli frue povis partopreni kunvenojn kiujn la klubo de Stockholm aranĝis. Kelkaj estis membroj de ambaŭ societoj, kaj pluraj abonis je la membrofolio el Stockholm, "Ekspreso".

La klubo de Södertörn estas kunmeto de la du kluboj en Tyresö kaj Haninge, kiuj situas je la suda parto de la regiono de Stockholm. La kluboj de Tyresö kaj Haninge fondiĝis en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj. Komence okazis vesperaj kursoj en ambaŭ lokoj. Nuntempe pluraj el la membroj havas taskojn en esperanto-organizaĵoj je diversaj niveloj, kaj tenas la lokajn kontaktojn per neformalaj manieroj. Loka aktiveco en Haninge nun okazas kunlabore kun membroj en Stockholm.

El la mono en la kluba kaso, ĉiuj membroj de Södertörn ricevis novan esperanto-libron, dissendita dum majo – junio. La restanta sumo estos kunmetita kun la kaso de la klubo de Stockholm.

Ulla Luin

Är Du en av dem som har glömt?

Glömt skriba ditt namn på targon, när du betalade årets medlemsavgift? Inbetalningar i början av året saknar fortfarande namn.

Kontakta Anita Dagmarsdotter tel. 070 3299 399, så att du kommer med i medlemsregistret.

Hälsningar
Anita

Socikultura Semajnfino

La 26an de junio la parlamento de la Esperanta Civito unuafoje sesiis en sia nova legacia adreso, nome en la Solidardomo en Stokholmo

Ni ĝojas pro la sukcesa Socikultura Semajnfino, kaj ni planas duan Socikulturajn Sabaton, pri tute alia temo, en oktobro 2015.

Al tiuj kiuj ĉeestis la inaŭguron de la Norda Legacio, la Konsulo de la Esperanta Civito, s-ino Marie-France Conde

Rey, donacas unu el la ĉi-jaraj numeroj de "Heroldo de Esperanto", en kies kvara paĝo aperas la detala enhavo de ŝia prelego, kun aliaj interesaj artikoloj.

Bertil Nilsson
legacia asistanto
se_legacio@esperantio.net

Esperanta Civito - Norda Legacio
Solidaritethuset, Stokholmo

Signild Johansson

Mia patrino Signild Johansson mortis la 12-an de majo 2015 en Kalmar. Ŝi naskiĝis en 1922 kaj eklernis Esperanton en 1938.

Ŝi estis aktiva esperantisto kaj ĉeestis en multaj UK-oj. De multaj jaroj ŝi estadis ano de SEF.

Sten Johansson

Korespondi deziras

Saluton, mi estas lernejestro de nia amata lingvo en Kongolando, suda Skivuo provinco, urboj Bukavu kaj Uvira.

Mi ŝatus interŝanĝi ideojn kun vi pri religio, politiko, agrikulturaj projektoj, manmetioj, turismo kaj pri Esperanto, se kompreneble vi ekeksprimus vian konsenton.

Mi instruas Esperanton al georfoj inter ses kaj deksep jaroj. Mi fondis etan Farmon.

Mi ankaŭ multe interesiĝas pri agrikulturaj projektoj, abelbredado ktp.

Kore salutas al vi,
Mana N. Brinson
mana.esperanto.brinson@gmail.com

Ballader i långa rader

Trots regn och kyla i blomstermånaden så har det varit en riktig kvadsommar för min del. Sedan hösten 2014 knåpade jag på Valdemarskvädet, en hjälteballad om en av esperantorörelsens tidigaste pionjärer. Det kändes som ett naturligt steg in i nutiden efter att ha översatt flera gamla färöiska kväden till Esperanto (<http://nk.tone.se>, klicka på länken #44.Baladoj).

Ett halvdussin böcker av och om Langlet hade jag lånat om och om igen på fjärrlån. Före jul var jag hemma hos Björn Runberg, som skrivit om Valdemar Langlet ur Röda korsets synvinkel, och i april besökte jag Valdemars barnbarn Monika och hennes bror och frågade ut dem om deras farfar.

Lagom till Svenska esperantoförbundets stämma i Uppsala i maj hade Valdemarskvädet vuxit till 250 verser, varav jag hade hunnit lära mig den första hälften utantill. Det är den del av sången som handlar om Valdemar Langlets äventyr i Esperantoland – framför allt Ryssland – från 1890-talet till 1920-talet. Den andra delen handlar om hans djärva, enträgna och uppoffrande arbete på ålderns höst för att rädda judar och andra förföljda i Ungern vid andra världskrigets slut.

Alltnog, i Uppsala vandrade SEF-kongressen till den centralt belägna lilla Valdemar Langletparken vid Fyrisån strax uppströms om Domkyrkan. Tillbaka i kongresslokalen, i det hus där världens första esperantoklubb bildades, dansade vi de tre första delarna av Valdemarskvädet efter färöisk förebild, två steg åt vänster och ett steg åt höger. Olof Pettersson filmade (vimeo.com/128071975) för att kunna visa fransmännen, som höll på att organisera världskongressen, vad kvaddans är för någonting. Vi hann också med Brestiskvädet, min personliga favorit bland de färöiska hjältekvädena, på

SEF i Langletparken /Martin Strid



Esperanto. Det är en kort ballad, bara 60 verser, som man sjunger på 20 minuter. Ändå hade jag "fusklapp", för är man ovan är det lätt att komma av sig om det är litet stökiigt.

En dryg månad senare var det dags för Elfriden, en elbefriad musikstämma (tone.se/pag.php?elfride&lng=sv), som är på en gammaldags fäbod vid vägs ände i Dalarna, veckan direkt efter midsommar. Kalaset är litet, men i år kom det fler än någonsin, tjugo personer varav cirka hälften talade Esperanto. De kom från Polen, Litauen, Krim, Japan, Södermanland och andra länder. Huvudattraktionen på fäbodveckan var en femdagars kurs i långdans. Vi sjöng och dansade i fäbodlagets iordningställda tröskloge.

Genast efter Elfriden infaller den så kallade stämmoveckan. Den är för många spelmän lika helig som älgjakten är för jägare. Våra litauiska gäster följde med till Tobakspinnarstämman, Bingsjöstämman och spelmansstämmorna i Östbjörka och Boda. Marius sade att nästa år ska han ta med hela sin familj och hela sitt band till Elfriden.

En månad efter midsommar bar det av till Färöarna. Det skulle ordnas en balladkonferens i Torshamn i år (<http://ballads2015.fo>) med anledning av bokhandelns 150-årsjubileum. Det var därför jag började skriva en artikel (<http://nk.tone.se/>, under rubriken "Aldone pli kone") om mina översättningar från färöiska till Esperanto, som ledde till en matematisk analys av färöiska kvädens takt och ton och utmynnade i det nyskrivna Valdemarskvädet. Två kvaddansutlärare från Elfriden var med på konferensen.

Deltagarna kom från de nordiska länderna, Tyskland och Frankrike (inkl. Mauritius). Mitt intryck är att konferensen till både innehåll och form överträffade deltagarnas förväntningar. Jag fick i alla fall lära mig mycket om ballader, kvaddanser, konsten att skipa, dvs leda en långdans med sång, och kulturen på Färöarna.

Torshamn var sommarvarmt, med sol varje dag och fullsatta hamnkaféer. Sista kvällen, efter avskedsbanketten, kom det färöiska dansförbundet och hade sin avslutningslångdans tillsammans med oss. Det är något speciellt med att trampa fram i ballader i en hundrahövdad kedja som ringlar i många veck så att den fyller ett helt dansgolv.

Det är denna sedvänja som jag vill lansera i esperantovärlden. Jag ser flera fördelar med den. Själva dansen är egentligen enkel, med sex lättbegripliga steg, även om det kräver övning att få en bra känsla och rytm. Den kan i princip framföras när och var som helst där esperantister träffas, i stort och smått, i ett lokalt klubbmöte, under en internationell kongress eller på ett ungdomsläger. Den tar inga musikinstrument; människokroppen är det enda instrumentet – rösten, stegen, kedjan av händer, ögonkontakten, inlevelsen i berättelsen. Den bör heller inte framföras med elektronik (vilket jag själv fick erfa en vecka senare): ingen högtalare, ingen mikrofon, bara rent akustiskt. Det enda som krävs är att någon kan skipa – har lärt sig kvädet utantill – och att de andra – mellan fem och tvåhundra personer – är "med på noterna".

I det häfte (<http://nk.tone.se>, klicka på länken *Du baladojn heroajn*) som jag gjort i ordning till världskongressen i Lille nämner jag tre skäl till att lansera en balladkultur på Esperanto: För det första är kvaddans ett väldigt trevligt sätt att umgås och göra något tillsammans. För det andra är det en bra språkövning att lära sig poesi utantill, särskilt för den som har få tillfällen att tala Esperanto till vardags. För det tredje kan en väl skriven hjälteballad vara en god historielektion för esperantister, som ofta har bedrövliga kunskaper i esperantos historia.

Dagen efter flög vi tillbaka till Köpenhamn och därifrån tog jag en buss mitt i natten som var framme i Lille tjugo timmar senare. Megan från Falun var med på samma buss. Det var nog första gången som jag var med på en hel Universala Kongreso (www.lve-esperanto.org/lille2015/) som fullt betalande deltagare. Men inte den sista!

Det var mycket folk i en stor byggnad, lätt att tappa bort varandra. Många saker hände samtidigt, det var svårt att välja vad man skulle vara med på, omöjligt att hinna med allt som var intressant, jag insåg efteråt att jag borde ha gått igenom programmet noga redan vid ankomsten och "spikat" ett personligt schema genom hela kongressen. Alltnog. Jag hade fått fyra tider under veckan för att framföra (eller ur min synvinkel: lansera) kväden på den helt nya inrättningen MAS - *Malkovriga Arta Scenejo*. Tre timmar sammanlagt, bara att tacka och ta emot.

Tyvärr visade det sig att de fysiska och tekniska förutsättningarna för kvaddans i MAS-lokalen var långt ifrån bra. Akustiken var sådan att framförande utan mikrofon och högtalare var fullständigt uteslutet. Golvet, ja hela lokalen, var av betong, inte så gott att dansa på. Ändå var det en medelstor intresserad publik som lyssnade sig igenom det ena kvädet efter det andra. Häftena som jag hade med mig gick åt som smör. Megan hjälpte mig att sjunga från scen så att jag fick kliva av en kort stund och lyckades få ihop en liten ring av människor som kvaddansade så gott de kunde mellan publiken och scenen. Françoise, en fransk spelman som gästade Elfriden för ett par år sedan, bidrog också. Så jag tror ändå att det kan ha väckt ett visst intresse. Organisatörerna och ljudteknikerna var ett bra stöd.

Efter några dagar i Lille hade jag bestämt mig för en sak till: Jag skulle skriva en bok om ballader och kvaddans. På Esperanto förstås. Den är nu påbörjad. Dessförinnan hade Megan och jag diskuterat att sjunga in ballader på Esperanto på skiva. Och i sista numret av Kongresa bulteno fick jag in ett meddelande om att kvaddanser kommer på nästa års världskongress i Nitra (www.nitra2016.sk/). Då ska jag vara bättre förberedd. Och förhoppningsvis kommer boken *Ĉendancu baladojn* då att vara både färdigskriven och tryckt.

Slutscenen i Lille var bra, för att inte säga fantastisk och romantisk. När nästa års kongressgeneral tillsammans med Nitras borgmästare hade tagit emot flaggan från Lille så höll han ett tal – där han friade! Han stod på knä på stora scenen och bad sin närmaste medarbetare att gifta sig med honom. Och hon svarade ja. Eller, som det heter på Esperanto: “Kompreneble jes!”

Martin Strid

Kallelse till årsstämma på Esperanto-Gården

Styrelsen för Esperanto-Gården ekonomisk förening kallar till årsstämma på Esperanto-Gården i Lesjöfors lördagen den 7 november 2016 kl. 16.00. Stadgeenliga ärenden.

I samband med årsstämman information och diskussion om framtidsplaner och viktiga ekonomiska beslut. Dessutom arrangeras kulturprogram.

Välkomna!
Styrelsen

Kulturprogram i samband med Esperanto - Gårdens stämma

I samband med årsstämman den 7 november 2016 arrangeras kulturprogram. Kl. 14 presenteras planerna för att återigen arrangera Kultura Esperanto-Festivalo i Sverige 5-10 juli 2016, 30 år efter den första festivalen i Uppsala. Vi tittar tillsammans på en professionellt klippt film från KEF 2005 i Helsingfors, där många kulturpersonligheter och deltagare intervjuas.

Efter årsstämman kl. 20 Owe Törnqvist och färöisk kvaddans med mera på Esperanto med Martin Strid.

Alla medlemmar och intresserade är välkomna. Boka övernattningar och mat på info@esperantogarden.se eller tel. 0590-30 909. Anmälan är inte obligatorisk, men meddela gärna när och hur du kommer. Följ även med info på www.esperantogarden.se

Nya böcker på esperanto

HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO

Finfine ĝi do aperis, post multjara laboro, la plej kompleta verko pri la historio de la esperanta literaturo. Ĝi enhavas vaste pli ol mil nomojn de esperantaj literaturistoj kaj certe estos la ĉefverko pri sia temo dum jardekoj, ĉar ne facile oni refaros ion similan.

Se oni volas trovi iun tendencon en la verko, oni povus diri, ke ĝi estas milde raŭmisma. Alion oni ne povus atendi, kaj pro la temo, kaj ĉar ambaŭ aŭtoroj estas raŭmismoj, Giorgio Silfer pli emfaze ol Carlo Minnaja.

Minnaja asertas en sia trarigardo super la lastaj dudek jaroj en ĉapitro 50, ke la nova generacio “estas jam tute raŭmisma”. Oni rimarku, ke li parolas pri generacio, ne la movado. Tamen, eble ankaŭ la

movado iom movetis sin de kiam Probal Dasgupta en la okdekaj jaroj artikolis en Esperanto Revuo sub rubriko priskribanta la manifeston de Raŭmo kiel intelektan bankroton.

Vera recenzo devas atendi pli kompetentan plumon.

Bertil Nilsson



LA KORTO — RAKONTO

de Kristian Lundberg. Tradukis Gunnar Gällmo. 146 p. 18 cm.

Kaptita de maŝaro de ŝuldoj, Kristian serĉas laboron en la plej multspecaj lokoj. Fine li estas dungata en la haveno de Malmö, en La Korto, inter la homoj pohore dungitaj de laborperanta entrepreno, kun la plej aĉaj laborkondiĉoj.

Prezo: 70 kr.

Prezentitaj en La Espero 1/2015:
SÖKA BOSTAD I STORSTADEN
Introduktionspris: 150 kr.

HODAPRO
Prezo: 85 kr.

Priserna är i svenska kronor.
Porto tillkommer.

Esperantoförlaget
c/o Nordenstorm,
S:t Olofsgatan 26,
753 32 Uppsala
eldona@esperantosverige.se

